

Zone euro : 3,50 € Suisse : 5 FS Autres pays : 4,50 €

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto :
vers une culture sociale sans frontières.*



Ekskursu Sete ! 22a-27a de Aprilo 2011

E3:
Agda Kabo



TT1 (26a) Nimo.



TT2 (26a) Eta Kamargo



TT3 (26a) La Suda Kanalo



TT4 (27a) Cevena trajno

E1: La lageto de Taño



E3: Monteto San-Klaro

<http://esperantosete2011.fr/>

Legindaj Legendoj Ganeŝo.

«Leginda Legendo» invitas vin legi legendojn el ĉiuj kontinentoj akompanatajn de lingvaj klarigoj. Kvankam ĉefe destinita al komencantoj, «Leginda Legendo» povas interesi ĉiujn legantojn!



Ŝivao kaj liaj kolegoj Brahmao kaj Viŝnuo estis la ĉefaj dioj regantaj la teron.

En tiu tempo, en la granda lando Barato, la dioj amis kaj amoris kaj koleris tute, kiel homoj. Oni diras, ke Ŝivao estis foje terura, helpema kaj li protektis la homojn kaj bestojn. Oni pretendas, ke Ganeŝo naskiĝis de la spirito de Ŝivao sed plej ofte, oni asertas, ke Parvato mem naskis Ganeŝon.

Parvato, la montaranino, la edzino de la dio Ŝivao, iam estis ĝenata de sia edza moŝto¹. Li eniris la ĉambron, kiam ŝi banis sin en sia apartamento. Iritita, ke ŝi havas eĉ ne unu personan servanton por gardi ŝian pordon, ŝi frotis al

si la korpon kaj per iom da malpuraĵo, formis estulon belan kiel radian tagon. Ŝi nomis la infanon sia filo Ganeŝo, kiun ŝi uzis kiel pordogardiston. Iam, Ganeŝo aŭdacis malebligi la edzon Ŝivao senpermesite eniri la domon. La dio kolere sendis siajn sbirojn³ kontraŭ lin. En la batalo, la kapo de Ganeŝo estis distranĉita. Pro la malfeliĉo trafinta ŝian filon, Parvato estis nekonsolebla. Ŝi postulis, ke oni redonu la vivon al Ganeŝo. Ŝivao, vidante la koleron kaj ĉagrenon de Parvato, deziris ripari sian malbonfaron⁴. Li komisiis homojn, ordonante, ke ili serĉu kaj revenu kun la kapo de la unua vivanto rigardanta al la nordo, plej bonaŭgura direkto, kiu ankaŭ signifas prudenton. La hazardo decidis kaj la unua estulo, kiun la senditoj bonkondiĉe⁵ renkontis, estis elefanto. Ili distranĉis ĝian kapon kaj portis ĝin al Ŝivao. Ŝivao kunmetis la kapon sur la korpon de la infano. Parvato tiam postulis plian kompenson. Ŝi volis ke ŝia filo jam estu honorita unuarange, antaŭ la aliaj dioj.

Vi ja rimarkis, ke Parvato naskis Ganeŝon per sia ŝvito sen la helpo de Ŝivao. Tio gravas, ĉar kutime, la dioj ne ŝvitis por ne havi ombron kaj ne velkigi la florojn. Parvato, do, iom homiĝis per tiu nasko.

La popolo tre ŝatas Ganeŝon kaj alinomas lin Vinajako (plej-bona-gvidanto), Gajanamo (elefantvizaĝo), Gajadhipo (elefantreĝo).

Klod

Notoj:

1	sia edza moŝto	son seigneur le mari.
2	senpermesite	sen la permeso
3	sbiro	policisto
4	malbonfaro	malbona ago
5	bonkondiĉe	en bonaj kondiĉoj
6	unuarange	je la unua rango

Seta kongreso Ekskursoj

La urbo Seto kaj ĝia regiono enhavas multajn interesajn kaj belajn. La organizantoj de la Renkontiĝo proponas, per aro da ekskursoj, konigi kaj ŝatigi ĝiajn turismajn kaj kulturajn riĉaĵojn.

Aŭdgvidiloj: La estraro de la urbo Seto konsentis realigi Esperantlingvan aŭdgvidilon laŭ la temo: «Rondpromenado en la urbocentro». Vizitu la Turismoficejon kaj ĝuu tiun viziton de la urbo kun Esperantlingva gvidado.

La duon-tagaj

E0 : Fiŝaŭkcio

La fiŝkaptado estis, de la fondo de la urbo, ĉefa ekonomia aktiveco.

Hodiaŭ, grava ŝiparo de trolŝipoj, tinusŝipoj kaj multaj fiŝmetiistoj, fiŝkaptantaj mare kaj lagune, igas la urbon Seto la unua franca fiŝhaveno en Mediteraneo.

Normale, la vizito de la fiŝhaveno kaj de la elektronika fiŝaŭkcio estas malpermesita al la neprofesiuloj, tamen la Turisma Oficejo organizas vizitojn por la publiko, por 25 homoj.

■ Ni proponas du vizitojn, vendredon la 22-an de aprilo (labortago), je la 15-a kaj duono, kaj je la 16-a kaj 45 (foriro de Le Lazaret, per la urbaj busoj, je la 15-a kaj je la 15-a kaj 45.). Prezo: 10€ (urba buso)

E1 : Lageto de Taŭo (Thau): «Seto, la langvedoka Venecio»

Ni ŝipos tra la seta haveno kaj la kanaloj, kiuj kunligas la maron kun la lageto de Taŭo. Ni krosados inter tinusŝipoj, kargoŝipoj kaj ĉe granda pramŝipo, kiu ligas Seton al Maroko. Ni subpasos la levpointojn kaj poste ni navigos sur la lageto apud la ostraj (la famkonataj «*huîtres de Bouzigues*») kaj mitulaj parkoj.

■ Sabate je la 14a, dimanĉe matene kaj posttagmeze. Prezo: 15€ (buso kaj ŝipirado)

La tuttagaj ekskursoj estas prezentitaj p.14-15 Vidu kovrilpaĝe aliajn fotojn tiurilatajn.



E0: Fiŝaŭkcio

E1: La lageto de Taŭo



E3: Agda Kabo



E3: Monteto San-Klaro

Priasociaj diversaĵoj

Franclingva suplemento

Kiel vi povas konstati ĉi numere, la komitato laŭ sugesto de la redaktoskipo decidis provi eldonon de la franclingva suplemento tutkolora, por valorigi tiun parton k ankaŭ instigi membrojn pli interesiĝi pri ĝi k aktive (ne nur lege) kontribui al ĝi. Ju pli da kunlaborantoj (eĉ neregulajn kespertajn, maletiuĝestas ankaŭ tre bonvenaj), des pli da diverseco en kontribuoj, da riĉigo de la revuo-enhavo, k des malpli da ŝarĝoj por ĉiu unuopulo! Ni tre dankas al tiuj, kiuj jam pli-malpli regule spontane kontribuas aŭ laŭpete helpas, sed ni bezonas ĉies kontribuon. Ne nepre ĉiunumere sed praktike, se ĉiu loka grupo sendus materialon nur dufoje jare, la afero estus jam multe pli taŭga.

Upso

Vi eble rimarkis (je skribo de tio la referendumilo ankoraŭ amasiĝas en la sideja demokratujo), ke en la referendumilo ricevita novembre ne aperis io pri komitataniĝo de SAT-Amikaro en Greziljono. Tamen en antaŭelektiĝa engaĝiĝo-teksto, kiun ni ĉi sube aperigas, SAT-Amikaro klare indikis:

«Sub rezervo de ratifo far la membroj per la jara referendumo en decembro 2010 de la kongresa decido, la asocio SAT-Amikaro kandidatiĝas, kiel societano, al la Komitato de la Esperanto-KulturDomo Greziljono. Estis mandatita skipo por partopreni la komitatkunvenojn kaj tie esprimi la vidpunkton de la asocio.

Ni subtenas la principon projekti malfermon de la Greziljonejo kaj evoluigi la statutojn lige kun la kolektivoj kaj asocioj de Baŭĝea regiono, prioritare serve al la disvolvo de Esperanto. Ni konsideras, ke la esperantistoj solaj ne plu sufiĉas por vivigi tian strukturon.

Ni agos por certigi pli grandan travideblon

por la societanoj de la EKD pri la agadoj proponitaj kaj evoluo de ĉi projekto.

La ĉeesto de gravaj esperanto-asocioj en la Komitato de la kooperativa societo de Greziljono estos plia atuto por klopodi reakiri ĝian famon kaj daŭrigi ĝian kulturan agadon.»

El tio vi facile povas konkludi, ke estis miso, ke ne aperis la demando kun la referendumilo, k tion ni devas korekti. La komitato do petas pardonon pro la ĝeno okazigita pro tiu devigo resendi k resendigi referendumilon (rigardu dorsen de via sendfolio!), sed aliflanke tio ebligas al vi aparte konsideri la aferon, k leginte la raporton ĉe p6 vi eble havos pli precizajn rimarkojn k sugestojn por fari!

Retlisto

Menciinda afero: SAT-Amikaro de nun havas propran membronliston, kiu ebligas pliajn interrilatojn por funkciigi la membrarajn kunlaborojn k interŝanĝadon. Se vi ne jam aliĝis, jen la adreso:

<http://groups.google.com/group/sat-amikaro?hl=fr>

Filmo

Rapide pasas la tempo, k la laboro ankoraŭ fareda ĝis finpretigo de la filmo por Seto estas sufiĉe granda, por ke ĉiu, kiu interesiĝas helpi, povu tion fari! Do se vi pretas proponi vian helpon, kontaktu la sekretariojn: sekretario@sat-amikaro.org

Lokaj perantoj

Pluraj novaj homoj akceptis esti peranto en Nordo-Kalezio (*Marianne Dunlop*), Burgonjo (*Wenceslas Derivaux*), Centro (*Marc Noulin*), Limoĝio (*Isabelle Jacob*), dankon al ili! Iliajn kontaktilojn vi povas trovi en la asocia retejo (paĝo«*contacts*»).

Enhavo

- 1 [Kovrilpaĝo](#) Seta kongreso Ekskursoj
 - 2 [Legendaj legendoj](#) La Seta kongreso, turism-nivele
 - 3 Priasociaj diversajoj.
 - 4 [Kontribuo al vikipedio](#) : korpilrado
 - 4-5 Du konceptoj pri ekologio, 3a k lasta parto
 - 6 [HuMorelaj Linioj](#) Greziljono (artikolo)
- Supplément en français**

 - 7 George Soros chez UEA
 - 8-9 Dans la presse...
 - 10 Culture Eo: Disques
- 11 Praktikaj informoj
 - 11.12 [Kiel traduki](#) : Pile
 - 12 [Libro-servo](#)
 - 13 [Libroj vivas pli longe](#)
 - 14.15 [E-Kuku](#) [Setaj Ekskursoj](#) La tuttagaj Esperantistoj aktivas
 - 15.16 Greziljono (foto) Ĉe la lago 71

Ankaŭ vi proponiĝu por via regiono! Por Francio ankoraŭ mankas en regionoj: Akvitalia, Alzaca, Aŭvernja, Ĉampanjo-Ardena, Franĉ-Kontea, Korsika, Normandioj Alta k Malalta, Pikardia, Piktavio-Ĉarentia, Provenco-Alpoj-Lazurborda, Rodan-Alpa. Kontaktu nin!

Ha jes, lasta neforgesindaĵo: ĝojon k bonfarton al ĉiuj okaze de la novjariĝo!

Por la komitato, la sekretario
Markovo Vito

E2 : Monto San-Klaro (Saint-Clair)

La Monto San-Klaro naskiĝis proksimume kvin milionoj da jaroj antaŭ nia epoko, pro giganta falego kiu disigis ĝin de la Gardiola Masivo.

Tiel, ĝi iĝis insulo. Iom post iom, dank' al sedimentoj el la rivero Rodano, transportitaj de maraj fluoj, tiu insulo denove estis religita al la marbordo (fine de la 15-a jarcento).

Sur tiu situo, kromnomita «la Aparta Insulo» (*l'île Singulière*), estis kreita la urbo Seto, fine de la 17-a

jarcento.

De la supro de la Monto San-Klaro, oni povas admiri la belegan panoramon – la urbon, la havenon, la lagunon de Taŭo, kaj la tutan ĉirkaŭaĵon – kaj interesiĝi pri la homa okupado.

Sur la suda flanko de la Monto San-Klaro estas la Parko «*Les Pierres Blanches*», kie oni povas trovi kaj observi multe da tipaj vegetalaj specioj de la garigo.

■ Dimanĉe matene kaj posttagmeze, lunde matene. Prezo: 6€ (urba buso)

E3 : Agda Kabo (Cap d'Agde)

Tute artefarita banejo, proksime de Seto, ni vidos la plej novan kaj la plej antikvan partojn.

Unue ni vizitos la muzeon kiun oni nomas, france «*le musée de l'éphèbe*», pro fama statuo malmergita el la rivero Heraŭto.

Due, tute apude, piede ĝis la Konko: kurioza, nigra, duoncirkla strando el bazalteroj. Antaŭ almenaŭ duonjarcento nura aĵo videbla en tiu loko.

■ Dimanĉe matene kaj posttagmeze, lunde posttagmeze. Prezo: 15€ (buso)

Frédéric Bourquin
Serge Eysseric
Pierre Taupiac

Partoprenis en ĉi numero:

(laŭ alfabeto ordo)

Aleks	
Anne-Marie	
Fil	
Andreo	Andrio
Frédéric	Bourquin
Marielen	Desert
Serge	Eysseric
	Klod
Ĵak	Le Puil
Lino	Markovo
Vinko	Markovo
Vito	Markovo
Guy	Martin
Hubert	Martin
Lin'	Morel
Edmond	Plutniak
Jean	Selle
Serĝo	Sir'
Pierre	Taupiac
Juliette	Ternant

Kontribuo al vikipedio: Korfpilkado

Okaze de debato sur la «diskut-listo» de SAT, Jakvo Schram aludis al sporto pri kiu eĉ la nomon mi ne konis, kaj kies eco meritas interesiĝon, nome ĝi estas unu (la nura ?) el la raraj sportoj, kiuj ne nur estas geaj, sed kiuj plie havas regulojn kiuj dependas de la sekso de la ludantoj. (Ja sportoj povas esti geaj kiel teniso, «stoolball», «ultimate» ktp, sed en ili neniu aparta regulo baziĝas laŭ la sekso).

Korfpilkado aŭ **Nederlanda Korbopilkado** estas pilka sporto, tre simila al korbopilkado, eltrovita en Nederlando en 1902. La nederlanda nomo *Korfbal* tradukiĝas laŭvorte per «korbo-pilko».

Historio

Nico Broekhuysen, amsterdama instruisto serĉis ludon por siaj gelnantoj. En 1902, li ekkonis la «ringball» (simila al «netball»⁽¹⁾) en Svedio. Hejmen revenante, li inspiroigis el ĝi.

Pro ĝia origino, tiu sporto ludiĝas ĉefe en Nederlando, kaj Flandra Belgio. Ĝia ĉefa eco kuŝas en ĝia nepra geeco: kvar viroj kaj kvar virinoj en ĉiu teamo.

Ĝi estis prove ludita en olimpikoj de 1920 (Antverpeno) kaj 1928 (Amsterdamo).

La internacia federacio de Korfpilkado (FIK) naskiĝis en 1928. Ĝi arigas 51 federaciojn komence de la 21a jarcento.

Korfpilkado enlistiĝis en la «Mondaj Sportoj»⁽¹⁾ (*World Games*) ekde 1985. La monda ĉampionado okazas ĉiun kvaran jaron ekde 1978. En ĝi, regas Nederlando kaj Belgio...



Jakvo Schram, en 1968, juna kaj... svelta (dank' al *Korfbal*) !

Reguloj

Korfpilkado ludiĝas jen interne (40 m x 20 m) jen ekstere (60 m x 30 m) sur tereno disigita en du zonoj. En ambaŭ zonoj, troviĝas fosto, 3,5 m alta, ekipita ĉe la supro per korbo cilindroforma, kaj sen fundaĵo. La pilko similas tiun de l' futbalo.

La du teamoj konsistas el ok ludantoj, po du viroj kaj po du virinoj en ambaŭ zonoj (atako kaj defendo). Post ĉiuj du goloj (enkorbigoj), oni interŝanĝas la rolojn (atakantoj iĝas defendantoj kaj reciproke).

La regularo malpermesas:

- * paŝi kun la pilko (eĉ ne driblante kiel en korbopilkado)
- * provi goli kiam «kovrita» (kiam defendanto troviĝas inter la korbo kaj la atakanto, kiun li/ŝi provas bloki, estante je malpli ol braklongo unu de la alia)
- * «gardi» kontraŭulon de malsama sekso.
- * fizike kontakti.

En la unuaj tempoj, la teamoj konsistis el 12 teamanoj, kaj kiel por *netball*, la tereno estis disigitaj en tri zonoj.

Adaptita de Fr:Wikipedia «Korfbal»
Sergo Sir'

⁽¹⁾ Indas krei Eajn artikolojn tiurilate.

Du konceptoj pri ekologio

tria kaj lasta parto

Dum la subtenantoj de la desupra ekologio inklina ne la politikajn neakordojn, uzante la dirmanierojn «ĉies estonteco», «unuanima mobilizado» ekzemple, tiuj de la demalsupra ekologio prezentas la ideon pri diverseco de la ebloj akiri utilon aŭ profiton, do pri politiko. En la politika ekologio ĉefas la vorto «memstareco». Kvankam ĝi estas dubasenca, tiu vorto koncernas 2 nivelojn: la personan memstarecon, la kolektivan memstarecon. La persona memstareco estas kapablo difini kaj plenumi dezirindan taskon sen ekstera influo. La kolektiva memstareco estas kapablo agi en la skalo de la socio kaj baziĝanta sur la politika komunumo mem, ne sur superregado tia, kia estas oligarkio aŭ ekstera kredo revelaciata de religio ekzemple. La memstareco de socio ankaŭ signifas, ke ĉi tiu lasta kapablas vivteni sin, sen endanĝerigi la naturajn ciklojn aŭ resursojn. La memstareco kontraŭas al la tendenco de la industria socio partigi la laboron, specialigi la funkciojn, starigi disigon inter la fakuloj kaj la aliaj homoj, apartigi la produktadojn disde iliaj produktantoj. Laŭ la politika aŭ demalsupra ekologio, oni konsideras, ke la disvolviĝo de la tekniko kaj iloj, kiujn homoj ne aŭ ne plu primajstras, detruas la vivmedion. La ekologiisto *André Gorz* mallaŭdegis ne nur la produktivisman sistemon, kiu estigas tian situacion, sed ankaŭ la plimulton de la institucioj detruantaj la memstarecon, kaj unue la edukadon, kiu estas parto de la ĝenerala procezo elpelanta la sciadon, kulturon, mempensadon el la laboro kaj el la ordinara vivo, por koncentriĝi en specialigitaj strukturoj, tiel ke malboniĝas la rilatoj inter la homoj unuflanke kaj inter la homoj kaj la naturo aliflanke. En pli larĝa dirmaniero, tio simple signifas, ke la ŝtato detruas la socion. La politika ekologio implicas foreston de politika superregado, rifuzon pri ĉia alproprigo, kondamnon de normigaj aŭ subpremaj strukturoj. La antaŭgardo de la naturo kontraŭ difekto dependas de la respekto al la rajtoj de la nuntempaj homoj pri sana vivmedio. Konsidere la antagonismon inter regantoj kaj regatoj, la ĉefa kaŭzo de la difektiĝo de la vivmedio estas klare difinebla.

Hodiaŭ la scienco kaj tekniko pravigas superregadon. La fakto, ke oni prezentas la sciencon kaj teknikon sub la formo de nur neŭtralaj rimedoj, estigas ilin apartenaĵoj de la socia imageco. Ili fariĝis valoroj per si mem kaj troviĝas sur la praviga fundamento de la industria produktomaniero. La elpreno far la homoj el la iloj transformiĝis en elprenon far la iloj el la homoj.

La kritika tendenco de la sociologio pri sciencoj (anglalingve *science studies*) referencas la tekstojn pri la politika ekologio. Temas pri malmistifiko de tio, kio estas tro supraj prezentita kiel nekontestbla celo kaj do povas servi al superregaj agoj. En la industriigitaj landoj la superregeco progresas sub la masko de la tekniko profite por elito.

La nuntempa kritiko de la tekniko tamen ne signifas retroiron al la epoko de la tajlita ŝtono. La politika aŭ demalsupra ekologio rilatas al ŝanĝado de la kvanto kaj kvalito de la produktaĵoj. La simpla fakto, ke oni uzu objektojn, kiuj malrapide eluziĝas, estas ekologia paŝo respondanta al malpli da produktado kaj pli da primajstrado de la vivmedio. Tiel ekzemple ekologia

La desupra ekologio

La demalsupra ekologio

socio ne estus submetata al la sezonaj ŝanĝigoj de la modoj, kiuj okazigas ekscesan konsumadon de teksumaĵoj.

Tekniko ĉiam kongruas kun la valoroj, kiujn estigas ekonomia sistemo. Fundamentaj kritikoj estas farataj kontraŭ la danĝereco kaj la verŝajne subtaksata kosto de la atomenergio. Laŭ la demalsupra ekologio, la ĉefaĵo kuŝas en la ekonomia funkciado de socio kaj en la politika organizado de ĉi tiu lasta. Ne estas eble apartigi la demandon pri produktado de energio disde tiu pri ĝia utiligado. Vana estas la demando pri la atomenergio, por satigi bezonojn, se unue oni ne ekzamenas la demandon pri tiuj bezonoj kaj iliaj kialoj. Montriĝas, ke la industriistoj de la atomenergio klopodas, por krei novajn bezonojn, por pravigi ĝian disvolviĝon. La ekologiisto *André Gorz* citis la ekzemplon de la franca elektra kompanio *EDF*, kiu, en la 1970-aj jaroj, lanĉis la ideon pri «ĉio elektra» koncernanta interalie la doman hejtadon. Fakte, la ideo pri «ĉio elektra» estis komprenebla nur en perspektivo efektiviĝi planon de «ĉio atoma»: temis pri preparo de la publikopinio kaj de la elektoreto al anstataŭigo de naturaj brulaĵoj per la atomenergio. 30 jarojn poste, la komisiono de la francaj ekologiistoj por energio denuncis tendencon de la koncerna kompanio al subteno de la elektra hejtado, por pravigi superregadon de la atomenergio. La ekologiisto *René Dumont* alportis la jenan klarigon: «Signifa estas la fakto, ke oni elektas la atomenergion prefere al la suna, venta aŭ rivera energioj. Ĝi prezentas la deziron gardi la monopolon pri energio por malplimulto, kiu havas la povon».

La atomenergio estas rigardata kiel kontraŭdemokrata, ĉar la povo de la fakuloj tre rapide metas la popolon en preparitajn situaciojn, kiuj grave efikas, kaj estis ĉiam prezentitaj sub la formo de teknikajdecidojfaritajdeteknokratoj, kies nekontestebla kompetenteco koncernas la publikan intereson. Laŭ la opinio de la ekologiisto *André Gorz*, «Socio adoptinta la atomenergion implicas la starigon de teknikista klaso disciplinita, obeanta, en la maniero de la mezepoka kavalirismo sian propran kodon, sian propran internan hierarkion, ne submetata al la komuna leĝo kaj rajtigita pri larĝaj povoj kontroli, gardi kaj reglamenti» - «Rifuzo pri la atomenergia programo respondas al rifuzo pri la logikeco de la kapitalismo kaj pri la povo de ĝia ŝtato».

De alia flanko, la aŭstra verkisto *Ivan Illich* (1926-2002) konstatis la jenon: «La homoj scias tion, kion oni instruis al ili, sed ili ne plu lernas per si mem. Ili sentas, ke ili bezonas esti edukataj». Fakte, la scioj kaj konoj, kiuj ne estis akiritaj en institucio akceptita de la ŝtato (lernejo, universitato ktp) havas plu neniun valoron.

El la vidpunkto de la demalsupra ekologio, la rifuzo pri la ekscesa specialigado de la sciado kaj ties kaptado fare de iuj personoj etendiĝas ankaŭ al la kampo de la politiko. Ne devus ekzisti klaso posedanta la monopolon super la politika sciado. Potenca koncepto pri la demokratio ne toleras superecon de la fakulaj diroj. La aŭstra verkisto *Ivan Illich* esprimis jene tiun ideon: «Fakulo ne reprezentas civitanon, ĝi apartenas al elito, kies aŭtoritato baziĝas sur la posedo de netransdonebla sciado».

Atentiga estas la jena diro de la agronomo *René Dumont*: «La moderna nocio pri ŝtato, kiu sekvis post la feŭda reĝimo, sed kun multe pli grandaj centralizaj rimedoj, troviĝas hodiaŭ sub ĉiuj formoj de ekspluatado». Tial la ekologiistoj politikas.

Konsiderante en la tergloba skalo la kreskantajn neegalecojn, kiuj detruas homojn kaj la vivmedion, la ĉi-supre menciita ekologiisto diris, ke ili fontas el la «ĉie-esto de la naciaj ŝtatoj, kapitalistaj aŭ socialistaj, ties armeoj, policoj, konkuradoj, subpremo kontraŭ siaj popoloj, kaj el pli kaj pli ĝeneraligita torturo».

Se oni difinas la civilan socion per tuto de la rilatoj, kiujn estigas individuoj inter si ekster la institucioj, oni povas diri, ke la ŝtato detruas ĝin profite por asista kaj paternalisma maniero de solidareco. La demandon pri la ĉefa malhelpo al fondo de memstara kaj ekologiista socio la tiama prezidanto de la asocio *Génération Ecologie* (Ekologia Generacio, 1990-2002) - *Brice Lalonde* - traktis jene: «La ŝtato deziras ĉion administri, la naturon, la ekonomion, la laboron. La ŝtata sento, la ŝtata servo fariĝas unuarangaj kvalitoj, plejsupraj valoroj». Subtenantoj de la politika ekologio postulas malfidon pri la ŝtato; tio povas konduki iujn el ili al ambigua situacio, kiun oni konstatas hodiaŭ inter verduloj: «nek maldekstruloj nek dekstruloj, sed antaŭeniguloj» (franclingve, *ni de gauche, ne de droite, mais devant*).

De longe ripetita sofismo konsistas en la ideo, ke la ekonomia kreskado estus

necesa, por ebligi redisdonadon de la riĉaĵoj kaj akiri socialan egalecon. Laŭ penso devenanta de la germana ekonomikisto Karlo Markso (*Karl Marx*, 1818-1883), la ekologiistoj memorigas, ke la disdonado de la riĉaĵoj ne estas apartigebla disde ilia produktado. La ekspluatado de homoj fontas ne nur el la privata propio de la produktorimedoj, sed ankaŭ el submetiĝo de la koncernatoj al la giganta industria maŝino pravigata per la deziro ekonomie kreski. La ekologiisto *René Dumont* klarigis la aferon jene: «La socialekologiismo (franclingve *écologie socialiste*) direktas sian agadon multe pli antaŭen, ol ĉiuj komunaj programoj de la dekstrularo kaj eĉ de la maldekstrularo. Ĝi troviĝas tre maldekstre de la maldekstrularo en tute nova vidmaniero. Ĝi do ne estas senpolitikeca, ĉar ĝi estas unue kontraŭkapitalisma».

Laŭ la demalsupra ekologio, revolucio ne estas subita kaj perforta okazaĵo, sed estas renverso de situacio, persista irado al radikale alia socio. Estas necese, ke la kapitalisma imageco pri la pseŭdoracionala pseŭdoprimajstrado de senlima ekonomia kreskado estu forlasita. Tial iuj ekologiistoj uzas la dirmanieron «radikala reformismo» prefere al la vorto «revolucio».

La 2 konceptoj pri la ekologio ne konsistas simple en cirkonstanca aŭ taktika diverĝeco. Tuj de la apero de la ekologia pripensado diferencoj estiĝis kaj rilatis al politikaj preferoj, kiuj pli frue ekzistis. Dum la politika ekologio estas klopodado liberigi la homojn de subprema sistemo, kiu ne limiĝas je ekspluatado de la laborforto, sed trudas ankaŭ artefaritajn bezonojn, la ideologio de la daŭrigebla disvolvo montriĝas sub la formo de provo pri nedialektika sintezo el kontraŭaĵoj, tio estas malaperigi la kontraŭecon inter senlima ekonomia kreskado kaj limaj resursoj. En alia maniero diri, la daŭrigebla disvolvo estas la ideologio de la politika rezignacio antaŭ la triumfanta novliberala kapitalismo.

Jean Selle

Noto.

La elementoj de tiu artikolo fontas el la enhavo de la libro titolita *Les deux âmes de l'écologie - Une critique du développement durable*, verkita de la geografo kaj politikologo *Romain Felli*, eldonita de la firmao *L'Harmattan* (5-7, rue de l'Ecole polytechnique, 75005 Paris) en la jaro 2009.

HuMorelaj Linioj...

Ordinara nuntempa konversacio

–Paĉjo, vi devas foriri por la laboro. Ne forgesu viajn okulvitrojn, viajn orelaparatojn, viajn medikamentojn kaj prenu vian bastonon.

–Certe, mia filo. Kion vi faras hodiaŭ?

–Kiel kutime. Mi promeniĝos la hundon, babilos kun kamaradoj antaŭ la pordo de la domo...Kiam vi emeritiĝos, eble, mi anstataŭos vin en la oficejo.

–Jes, mi esperas ĉar vi estas afabla. Vi sukcesis multajn diplomojn kaj vi estas tridekjaraĝa. Do, mi parolos al mia ĉefo pri vi. Sed, diru: kie estas via fratino?

–Paĉjo, ĉu vi ne plu memoras? Ŝi laboras kiel telefonisto en emirlando ĉar ŝia firmao delokiĝis. Kompreneble, vi ne rekonis ŝin sur la foto ĉar ŝi estas devigata sin vuali.

–Sed, mi ankoraŭ ne vidis mian edzinon, kie diable ŝi restas?

–Ho! ve, mi maltrankviliĝas pri via kapo. Vi ne plu memoras, ke ŝi laboras nokte sur stratoj kaj trotuaroj?

–Sur trotuaroj! Ĉu vi ne hontas paroli tiele pri via patrino?

–Paĉjo, ne koleru. Ŝi balaas la fekaĵojn de la kameloj.

–Ĉu vi frenezas? Ĉu kameloj en nia urbo?

–Jes. Imagu ke, por plezurigi kaj riĉigi sian karan amikon **Serge Dassault**, la prezidento subskribis komercajn kontraktojn kun arabaj landoj: li interŝanĝis unu aviadilon «**Rafale**» kontraŭ du kameloj. De tiu tempo la ministroj iras kaj revenas per ili. Malpli kostas la nutraĵoj de la bestoj ol la benzino de oficialaj veturiloj. Oni pagas la laboristinojn per la vendo de ostoj, karno, lakto, haŭto de la kameloj.

–Dankon, filo pro viaj klarigoj. Kiam mi revenos hejmen, ni iros kune manĝi kamelsandviĉojn.

–Bonan laboron, paĉjo.

–Bonan ripozon, filo.

Lin' Morel'

Greziljono Kion ni povis fari...

Ĉu vi memoras la kovrilpaĝon de La Sago antaŭ unu jaro, en kiu Serĝo Sir' imagis ontan retrospektivan ekspozicion pri ruinaĵoj de la du kulturcentroj Greziljono kaj Kvinpetalo? Tiu kovrilpaĝo celis iom provokeme substreki la alvokon lanĉitan favore al subteno de la francaj kuturdomoj en grandaj malfacilaĵoj⁽¹⁾.

Sekve de la publikigita alvoko, kiun la kovrilpaĝo ilustris, SAT-Amikaro kandidatiĝis kaj elektiĝis en majo 2010 en la nova komitato de la kulturdomo de Esperanto (KDE). Ĝi engaĝiĝis disponigi sian retejon kaj revuon cele al malfermo kaj travidebleco en administrado de KDE.

Post 9 monatoj, kio okazis?

Ni kreis SAT-amikaran skipon: Fil Freslon, Françoise Guilhaumé, Vito Markovo kaj Guy Martin. Regule, ni interŝanĝas opiniojn pri temoj debatotaj en la komitato de KDE kaj ni partoprenis en la tri komitatkunvenoj pere de ĉefe Fil kaj Guy. Ni ankaŭ partoprenas en komisionoj pri projektoj, financoj, mastrumado kaj bonteno de la kastelo kaj parko.

Ni konstatas efikan kaj agrablan etoson inter la komitatoj. Interalie, la komitato sukcesis redoni al KDE ĝian leĝan ekzistadon, perditan en 2002. Pro sukcesa varbado kaj partopreno en aktivaĵoj, la komitato ĉesigis malkreskiĝon de somera ĉeesto. KDE ricevis averaĝe po 27 staĝantojn semajne dum 4 semajnoj kun 38% da eksterlandanoj.

Ĉi jaron 2011, pluraj aktivaĵoj ebligis plursezone malfermi la bienon al nova publiko ne nur esperantista kaj pli eksterlanda. Kiam vi ricevos ĉi tiun revuon, jarfina festo jam okazis kiel unua provo de la jam plenumitaj plibonigaĵoj kaj ektakso de la komforto-kriterioj en vintra sezono.

Pri travidebleco, jam protokoloj pri membrokunveno kaj komitatkunvenoj legeblas en la retejo de KDE.

Notinde ke pluraj novaj societanoj kaj fakuloj sin proponis kiel kunlaborantoj al la komitato.

Ni proponis okazigi nian kongreson en 2012 en Baŭĝeo kaj atendas respondon de la proksimaj kluboj pri kreado de organiza kongreskomitato.

Per la bilanco de 2010 kaj de antaŭaj jaroj, la komitato preparos la buĝeton 2011. Pri financa stato, SAT-Amikaro partoprenas en la komisiono, kiu laboros pri taksado kaj antaŭvido de ĝia evoluo. Sat-Amikaro proponos al la komitato de KDE debati la tarifojn, kiuj estis forte altigitaj en 2008.

Pli precize jen kelkaj planitaĵoj, kiuj rezultas el la unuaj komitataj pridiskutoj en KDE:

■ aferoj plenumotaj baldaŭ aŭ post ne tro longa tempo:

Jara kontrolo de la hejtkaldrono kaj ĝiaj

akcesoraĵoj, instalado – foje plenumita – de elektraj radiatoroj ĉe la teretaĝo kaj en iuj dormoĉambroj, prezo-taksoj pri la jara tegmento-plibonigado.

Planizado de arbo-dehakado pro tuja enspezo aŭ plurjara racia administrado de la arbareto. Celitas ties maldensigo kaj faciligo de pli efika disvolviĝo de la restontaj arboj. Rezultos el tio ioma enspezo dependa de la merkato.

■ aferoj, kiuj postulas plurjaran planizadon:

Okazis vizito de regiona respondeculino de la asocio «*Gîtes de France*». Ŝi esprimis prefere pozitivajn opiniojn, transdiris konsilojn kaj kriteriaran liston por eventuala aliĝo al ŝia asocio. Eka kaj plua rilato kun la komuneco da municipoj de Baŭĝeo ebligos komunan aranĝon (Verda Vojo) de iu parto de la iama fervojo *Saumur-Le Mans*, kiu trairas la bienon de KDE. Planitas turisma aktiveco favore al la Baŭĝea poluso, en kiu la KDE povos roli favore al si, se ĝi konsentos partopreni al la projekto.

■ banalaj sed nepraj aferoj:

Grandega kvanto da fatrasaĵoj – pli ol dudek kubaj metroj – estis transportitaj al urba rubejo. La ĉerizlaŭroj kiuj inklinitaj al arbiĝado estis tajlitaj por pli da lumo, loko kaj aerumado necesaj al la tute proksimaj konstruaĵoj.

Ni varme invitas vin viziti la retejon de Greziljono: <http://gresillon.org> kaj aliĝi en aktivaĵoj proponitaj en 2011.


Ni instigas vin reagi al tiu artikolo por nutri vian reprezentantan skipon en ĝia agado.

Por la SAT-Amikara skipo: Fil kaj Guy

⁽¹⁾ **noto:** Vidu lastpaĝe foton de la kastelo en ĝia nuna realo. Ĝin sendis Guy. Ĝin mi ne trukis, por aldoni neĝon, kio povus esti interpretata negative (kulturdomo malvigligita en la frosto). Mi ja nun scias ke kun kelkaj aferoj, oni ne ŝercu. Nur provokema vetero kulpis...

Serĝo Sir'


Ju pli Georgo soros, des malpli stilo de Lino sobos!



Lino Markovo

Supplément Fr.
Janvier 2011

George Soros, participant d'un symposium de UEA⁽¹⁾



Le symposium du bureau New-yorkais de UEA a été l'objet d'une attention toute particulière et inhabituelle cette année, en raison de la présence de George Soros, le milliardaire mondialement connu. Un des points du programme était la présentation de la traduction en Anglais de «*Modernaj Robinzonoj*» (Les Robinsons modernes)⁽²⁾ œuvre écrite en espéranto par le père de George Soros, parue pour la première fois en 1923. Au cours du symposium, on a pu même constater que George Soros avait appris par cœur un poème de Zamenhof.

Le symposium New-yorkais de cette année s'intitulait «De Zamenhof à George Soros». Outre les quelques 70 participants, l'initiateur de l'espéranto⁽³⁾ lui-même fut présent sous la forme d'une biographie sommaire en Anglais, rédigée et traduite à partir d'une version en espéranto plus vaste, rédigée et éditée par Alexandre Korjenkov, il y a deux ans.

Ralph Dumain présenta une étude sur les articles de presse parus à l'occasion de la visite de Ludovic Zamenhof aux Etats-Unis, en liaison avec le Congrès Universel de Washington en 1910. Le cinéaste de documentaires Sam Green présenta une esquisse de son prochain film sur l'espéranto.

Mais l'attention des journalistes fut principalement centrée sur la présence de George Soros, arrivé en fin de symposium, pour participer au lancement de la traduction anglaise du «*Modernaj Robinzonoj*» écrit par son père Tivadar Soros, alias Teodoro Schwartz, après une longue captivité en Sibérie, suite à la première guerre mondiale.

En chemin vers Moscou, il joua un rôle dans la fondation de la première association espérantiste soviétique, ensuite à Budapest avec ses amis Kalocsay et Baghy, il lança la revue «*Literatura Mondo*». Auparavant des traductions furent éditées en diverses langues de son autre œuvre connue «*Maskerado ĉirkaŭ la morto*» (Mascarade autour de la mort) dont le thème central est l'occupation nazie de la Hongrie.

L'idée de traduire en anglais aussi l'œuvre plus ancienne de Tivadar Soros date de plus de

10 ans, comme le raconte Humphrey Tonkin:

«- J'ai fait la traduction en 1999 sur la demande de la famille Soros, pour satisfaire leur envie de connaître le contenu. J'ai ajouté un long préambule et de nombreuses notes. De temps à autres, nous nous sommes entretenus sur l'opportunité d'une édition. Ce n'est que récemment, qu'est venue d'Italie, une proposition d'utiliser mon préambule



Humphrey Tonkin
la tradukisto.

et mes notes pour une traduction en Italien. Cette traduction fut faite par Margherita Denti (Margherita Bracci Testasecca) et le livre parut chez l'éditeur Gaspari, l'automne dernier. J'ai proposé ma traduction en anglais à Mondial, et j'ai reçu aussitôt l'autorisation des frères Soros, qui

rédigèrent une préface.

Libera Folio: Quel type de rapport eut la famille Soros avec ce projet ?

- Comme vous savez, j'ai aussi traduit «*Maskerado ĉirkaŭ la morto*» à la même époque. La famille a presque tout de suite décidé de le publier. Il parut la première fois avec succès dans une édition britannique de l'an 2000 (publié en feuilleton dans deux grands journaux britanniques mais aussi en livre), et en 2001 aux Etats-Unis (mais malencontreusement, le même mois que l'attaque du World Trade Center). On projette actuellement une réédition. Je mentionne ceci pour expliquer que les deux frères, Paul (l'aîné) et George se sont activement préoccupés de mon travail, et j'ai fait avec eux, plusieurs interviews, et autres prestations de ce genre, au sujet de leur père.

Libera Folio: Pourquoi vous même estimez cette œuvre digne d'intérêt ?

- Les deux œuvres montrent une inventivité et un courage extraordinaire - intéressants en soi - mais aussi comme clés des caractères des deux frères (Paul est un ingénieur efficace, chef d'entreprise)

La récente traduction anglaise, parue aux éditions Mondial de New-York, comporte une préface des frères Soros. George Soros et son fils Jonathan assistèrent au lancement de l'œuvre à l'occasion du symposium de UEA à New-York. George Soros prit la parole une dizaine de minutes pour évoquer le rôle que l'espéranto avait joué pour son père, les rencontres qu'il eut avec d'autres auteurs espérantistes à Budapest, et de l'aide qu'il reçut des espérantistes à son arrivée en Grande Bretagne en 1947.

Après le symposium, un journaliste demanda à George Soros, s'il avait encore en mémoire un peu d'espéranto. Sans hésitation il cita «*Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan*».⁽⁴⁾

**Traduit de l'espéranto par Serge Sire,
d'après l'article de Libera Folio
<http://www.liberafolio.org/2010/george-soros-ceestis-simpozion-de-uea>**

Notes:

⁽¹⁾ UEA (Universala Esperanto Asocio) est une association espérantiste mondiale neutre.

⁽²⁾ Titre anglais «*Crusoes in Siberia*»

⁽³⁾ Louis Lazare Zamenhof.

⁽⁴⁾ Information sujette à caution: comment un journaliste américain a priori non espérantiste a-t-il pu rapporter ceci ?





...George Soros

(suite de la page précédente)



Wikipedia, Jeff Ooi

George Soros financier milliardaire américain, né le 12 août 1930 à Budapest (Hongrie) est devenu célèbre pour ses activités de spéculation sur les devises et ses activités de philanthropie. Il est à l'origine des hedge funds apparus dans les années 1970. Il est actuellement président de Soros Fund Management et de l'Open Society Institute.

Réputé être «L'homme qui fit sauter la banque d'Angleterre» suite à sa spéculation du «mercredi noir» le 16 septembre 1992 où sa spéculation contre la livre lui rapporta la bagatelle de 1100 mégadollars, il n'est évidemment pas en odeur de sainteté dans les milieux espérantistes tels que le notre...

L'article de Wikipedia qui lui est consacré le dit «locuteur natif de l'espéranto», mais comme le rapporte H. Tonkin (page précédente) il a eu besoin d'une traduction en anglais pour connaître le contenu des œuvres de son père, ce qui donne à penser que s'il a été locuteur de l'espéranto en naissant, il a cessé de l'être bien avant sa première dent...

Si l'article de «Libera Folio» s'extasie sur la citation en espéranto de Soros, l'évènement a été redimensionné avec humour par un de ses «contr-admirateurs» : «Nia malsamideano Soros malkrokodiligis kelkajn vortojn...». Les explications nécessaires pour déguster l'expression, bien qu'un peu longues, permettent au passage de présenter quelques «spécificités» de l'espéranto et de l'usage qu'en font les espérantistes.

Malsamideano: Entre-eux, les espérantistes s'appellent parfois samideano (sam=même, ide'=idée, ano=membre soit «membre d'une même idée») **Mal**, c'est le contraire (comme en français **mal**adroit) Mais «malsamideano» est complètement inhabituel et, en tous cas, jamais employé pour désigner un non-espérantiste. Il prend ici donc le sens ironique de «faux-frère», voire d'«anti-frère».

Malkroodiligis: Krokodili («crocodiler»), c'est parler dans sa langue nationale dans un contexte de réunion espérantiste. Malkrokodili (mal=le contraire, voir ci-dessus), donc parler en espéranto dans un contexte espéranto, n'est jamais utilisé, parce que c'est la situation normale. Ici aussi l'expression prend un sens ironique où Soros utilise sa langue prétendument maternelle dans un contexte anglophone... Si malkrokodili c'est «non-crocodiler» (intransitif) malkrokodiligi c'est «non-crocodiliser (quelque chose)» et la phrase se comprend «notre faux-frère Soros decrocodilisa quelques mots».

Toutefois l'évènement, qui a eu quelques retentissements met en relief que l'espéranto est bien présent, même sur le sol Etatsunien, et qu'il s'y trouve des espérantistes de talent, sinon Soros, du moins Humphrey Tonkin.

Serge Sire



Caylar, Causse du Larzac Epoustouflant !

■ C'est ainsi que l'on peut qualifier le concert de JOMO, samedi soir, 11 décembre, à la salle des fêtes du Caylar devant un public malheureusement trop peu nombreux, puisque seulement trente personnes étaient présentes. Malheureusement, parce que, comme les affiches l'annonçaient, JOMO est un artiste qu'il faut absolument découvrir. Sa prestation de l'autre soir a tout à fait confirmé notre intuition.

Avec sa belle voix, ce chanteur polyglotte et musicien talentueux nous a entraîné dans un voyage de deux heures à travers les langues, les musiques et les chansons du monde, deux heures de spectacle sans un moment de répit pour lui, sans une seconde d'ennui pour nous. JOMO a chanté en pas moins d'une douzaine de langues, faisant une présentation trilingue (français, espéranto, occitan) de chaque morceau et égrenant informations et anecdotes concernant les deux sujets, la chanson et les langues, pour lesquels il est une véritable encyclopédie vivante. Et tout cela sans jamais se prendre au sérieux, mais au contraire en maniant un humour irrésistible. Se transformant en véritable homme-orchestre avec son «échantillonneur» - petit appareil électronique lui permettant d'enregistrer sur place et de repasser en boucle plusieurs bouts de musiques superposés - JOMO a mis une ambiance incroyable, nous faisant participer et même, pour certaines, danser. Sautant d'un genre à l'autre avec une aisance surprenante (musique klezmer, chanson française, rock serbe, chœur russe, folk américain, musique africaine, orientale, traditionnel occitan, créations personnelles en espéranto, et j'en passe), il nous a tous laissés pantois. JOMO en août 2011. Bref, ça nous a tellement plu - comme il gagne à être connu - que nous pensons le réinviter pour le Festival du Roc-Castel 2011, sans doute pour la soirée finale, notre fête des langues, ROC BABEL CAFé, le jeudi 4 août. Alors à vos agendas pour ne pas rater cette fois le «phénomène» JOMO!

Et merci à la Communauté de Communes et à Mathieu Dardé, son animateur culturel, qui nous ont permis d'utiliser la sono mise en place pour le lendemain pour le **balèti** de Coriandre. Merci enfin à Fred, le sonorisateur et «illuminateur» qui a su mettre en valeur le concert de Jomo.

Hubert Martin

■ L'Indépendant du 19 décembre publie un article intitulé Les espérantistes ont fêté le « Jour de Zamenhof ».

C'est une coutume à laquelle jamais ils ne dérogent : chaque 15 décembre, les espérantistes fêtent le 'jour de Zamenhof' (Zamenhofa tago) en mémoire de la naissance, le 15 décembre 1859, de Louis-Lazare Zamenhof, l'initiateur de la langue internationale espéranto.

Le groupe « Espéranto Conflent » n'a une fois de plus pas failli à cette tradition, en se retrouvant autour d'une table bien garnie pour rendre hommage à la mémoire de celui qu'ils qualifient d'« infatigable apôtre de la paix entre les peuples, d'humaniste amoureux de l'entente entre les Hommes, d'un génial inventeur d'une langue neutre

qui visait à donner aux hommes, à l'aube d'un XX^e siècle naissant, un outil pour faire tomber la barrière des langues ».



Le Monde du 16 décembre 2010 (sorti le 15, date du 151e anniversaire de la naissance de Zamenhof) publie une double page de publicité sur l'espéranto (p16-17) qui comprend une interview de Zaleski-Zamenhof (petit-fils du fondateur de l'espéranto) intitulée L'espéranto, ou la réussite d'un certain esprit humaniste, une Petite leçon d'espéranto et un encart sur L'espéranto dans le monde.

L'annonceur à l'origine de cette initiative est Etsuo Miyoshi.



Il y a une solution au problème linguistique

«Une langue nationale n'est pas la réponse. L'espéranto serait une solution non-discriminatoire.»

Les droits linguistiques ne sont pas respectés... 425 milliards perdus par an pour l'Europe linguistique dans l'apprentissage...

Oui au plurilinguisme en Europe... Avant son tragique décès en 2008, le député européen britannique Graham Davies...

La France mit son veto à la solution... La journaliste franco-Médo, sous-secrétaire générale de la Société des Nations...

Cette langue s'apprend dix fois plus vite que l'anglais, elle ne connaît pas d'irrégularités ni d'exceptions.

Aujourd'hui, c'est le 151e anniversaire de la naissance de l'initiateur de l'espéranto, Dr L.L. Zamenhof

L'Espéranto, ou la réussite d'un certain esprit humaniste

A l'occasion des 150 ans de la naissance de Louis-Lazare Zamenhof, le fondateur de l'Espéranto, son petit-fils Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof revient sur les origines et les fondements de l'ambitieux projet de son grand-père, une langue internationale pour tous les peuples.

C'est à 127 ans, l'Espéranto était une idée nouvelle. En son pays, cette tentative avait été jugée un crime d'État... L'Espéranto serait donc l'initiative d'un grand humaniste ?

L'Espéranto dans le monde... L'Espéranto dans le monde est à l'heure de la mondialisation, des échanges, de la coopération...

Petite leçon d'Espéranto

L'Espéranto est une langue très facile à apprendre. Quelques exemples d'expressions... Bonjour ! (Saluton !), Merci ! (Danke !), Au revoir ! (Adiaŭ !)



Un rêve lointain

« Il pensait offrir à l'humanité une nouvelle ère de paix », souligne Christian Pinard, président du Groupe Espéranto-Conflent « Hélas, ce fut ce XXe siècle qui connût les deux Guerres Mondiales, et le rêve de Zamenhof, s'il est encore partagé par beaucoup, se révèle encore bien lointain et difficile à réaliser, même plus d'un siècle plus tard ».

Nonobstant, ce sont les rêves qui donnent aux hommes le courage de rester debout face à l'adversité, et c'est donc sans la puérile et vaine croyance d'un succès

proche, mais avec le sentiment de devoir garder intact pour les générations à venir le feu sacré qui animait Zamenhof que les membres du groupe ont partagé ce moment de convivialité renouvelée.

Chacun avait amené qui de quoi manger, qui de quoi boire, et les douceurs préparées avec gourmandise par tous, associées aux langues des vins de nos coteaux, ont vite conduit le groupe à entonner, en espéranto bien sûr, quelques parodies de chants traditionnels amicalement transmis par l'ami Jean Amoureux, de Perpignan.

De l'Estaca à La Paliso

D'une aimable moquerie sur la grammaire espérantiste chantée sur l'air de « Mon beau sapin », à une hilarante histoire de marin et de fromage d'Edam

aux accords de « L'Etoile des neiges » en passant par la « La Paliso » (« L'Estaca », mais oui !) c'est tout un répertoire comique ou local qui a ainsi réchauffé l'âme et le cœur des amis.

Celles et ceux qui sont curieux de connaître quelques aspects de l'histoire du mouvement espérantiste dans notre région pourront à leur tour venir écouter une conférence sur ce thème, en février 2010, placée sous l'égide du groupe « Art et Culture de Vinça »

En attendant, le groupe Espéranto Conflent vous souhaite de « Bonajn festojn de Jarfino » (bonnes fêtes de fin d'année) !

Va. P.

Qu'est-ce que SAT ?

Sennacieca Asocio Tutmonda: Association Mondiale Anationale, fondée en 1921, est une association mondiale de travailleurs et plus généralement de progressistes dont l'activité est centrée sur la culture et l'éducation populaire. Elle utilise l'espéranto comme langue de travail.
www.satesperanto.org

Qu'est-ce que SAT-Amikaro ?

L'amicale de SAT: l'Union des Travailleurs Espérantistes de Langue Française, fondée en 1945, est l'association espérantiste de langue française qui s'occupe de diffuser et enseigner l'espéranto en francophonie dans les milieux progressistes et permettre ainsi l'accès à SAT.
www.sat-amikaro.org

Culture espéranto: 2 nouveaux CD



Dolchamar et Inicialoj DC, aux antipodes.

Créé en 1999 et avec quatre albums à son actif, Dolchamar est déjà un groupe «ancien» au pays de l'espéranto, avec une remarquable stabilité. «Trajn'nenien» est une étape supplémentaire sur leur parcours. Petite déception à l'écoute: musique très propre, bien jouée, professionnelle, mais rock trop sage, trop homogène, qui semble rester dans la nostalgie de leurs premiers congrès, guitares électriques en bandoulière. Un peu trop mécanique, sans jamais aucun débordement, comme si la composition du groupe suffisait à garantir un esprit rebelle déjà rangé depuis longtemps, dans la douceur d'une amicale reconnaissance. Cette monotonie est au dépend du texte, et mes enfants ados se sont ennuyés en l'écoutant. Dommage, avec des instruments comme ceux-là on aurait aimé quelques solos. Sans doute en concert le groupe dégage-t-il une autre énergie, tandis que le CD lui-même évoque davantage la chanson de variété, avec des textes faciles à retenir et à chanter, un peu doux-amers, à l'image de Dolchamar.

Plus onirique, l'album d'Eric Languillat, alias Inicialoj DC, qui décline sa poésie sur une musique à la fois électronique et plus planante. La démarche est tout autre sur le plan musical, axée sur un travail en studio où le musicien, guitariste, élabore seul les effets avec une vraie recherche sonore. Ponctué de petites surprises musicales savamment dosées, les textes mélancoliques, un peu à la dérive, sont de vrais poèmes. L'ensemble dégage une ambiance tout à fait particulière, qui semble la marque de ce chanteur singulier. Agréable, intéressant, à suivre.

Dolchamar: Trajn'nenien 2010
Inicialoj DC: Urbano 2010
A commander sur Vinilkosmo.com ou dans votre «libroservo» favori.

Marielen Desert

Permanence au siège

Lundi	17h30 – 19h30
Mardi	10h00 – 16h00 (non régulière)
Mercredi	14h30 – 18h00
Jeudi	15h00 – 18h30
Vendredi	09h30 – 17h 00 puis 17h30–19h30
Samedi	11h00 – 18h00

Cours oraux au siège – pour débutants:

Les lundis 17H30 avec Georges Meilhac
Les mercredis 14H30 avec Hélène Bonjour.
Les samedis 14H00 avec Vincent Charlot

Cours d'espéranto par correspondance : inscription directe auprès de :

C. Gerlat 11 bd M-al Leclerc 38000 Grenoble.
Tel: 0476 01 91 71;
Ret: claud.gerlat@orange.fr

Retrouvez toute la liste des cours d'espéranto sur le site de SAT-Amikaro, rubrique «Cours d'espéranto»: <http://esperanto-sat.info/rubrique97.html>

Cette rubrique tente de référencer un maximum de cours d'espéranto se déroulant en francophonie. Pour toute mise à jour ou cours manquant, nous contacter.

Service Librairie par correspondance pour les adhérents (catalogue sur demande)

Au siège; Net: libroservo@sat-amikaro.org

Renseignements sur l'espéranto:

FRANCE: SAT-amikaro 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
BELGIQUE: Claude Gladys, Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine
SUISSE: Mireille Grosjean, Grand-rue 9, CH-2416 Les Brenets.

Contributions pour ce supplément à envoyer :

– de préférence par internet, à lasago@free.fr, en format RTF ou TXT pour un document joint, ou directement dans le corps même du message, et en format TIFF, JPEG ou GIF pour les images.
– éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) à envoyer à: **Serge SIRE, La SAGO 85 impasse des Fées 74330 Sillingy**

LA SAGO. CPPAP n° 0312 G 86224.
ISSN: 1763-1319.
Directeur de la Publication : Guy Cavalier.
Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Senart.
Dépot légal à parution.

LA SAGO – Janvier 2011.
Espéranto
vers une culture sociale
sans frontières

Praktikaj informoj

La SAGO

Kiu faras Kion?

Directeur de la publication: Guy Cavalier.
Ĉefredaktanto: Vito Markovo.
Enpaĝiganto: Serĝo Sir'.
Redakt- kaj korektskipo: Andreo Andrio, Francua' Dekurcelo, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir'.
kun helpo de: Janine kaj Yannick Dumoulin, Veronique Girard, Phil Guichet, Lino Markovo.

Kontribuaĵoj

Ja ĉiam bonvenaj! Sendu ilin:

- Prefere per reto, al lasago@free.fr, tekstoj en RTF- aŭ TXT-formo por aneksitaj dokumentoj, eventuale en la korpo mem de la mesaĝo, skribitaj prefere en Unikodo, bildoj en TIFF-, JPEG- aŭ GIF-formo.
- Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku margene) al La SAGO, ĉe Serĝo Sir'. (ne tajpitaj kontribuaĵoj publikeblas nur se troveblas volontula tajpanto)
- Artikoloj ricevitaj post la 20a de iu monato ne povas esperi aperigon en la tuj sekvanta numero.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Adresaro

La SAGO-abonoj: ĉe Guy Martin,
La SAGO-redaktado: ĉe Serge Sire.

Sidejo de SAT-Amikaro: 132/134 boulevard Vincent-Auriol 75013 Paris
Tel.: 01 44 24 50 48

TTT-ejo: www.sat-amikaro.org

Reto: sekretario@sat-amikaro.org

Claude Gerlat 11 bd Maréchal Leclerc 38000 Grenoble tel. 04 76 01 91 71

Reto: claude.gerlat@orange.fr

Claude Glady: Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine; Reto: cglady@arcadis.be
Tel: 071/64 49 16 (en Belgio).

Mireille Grosjean: Grand-rue 9, CP 9 CH-2416 Les Brenets

Guy Martin: 3 rue Voltaire 22000 Saint-Brieuc;

Reto: kasisto@sat-amikaro.org
tel: 0033 (0)953 927 737

fakso: 0033 (0)222 441 319

Serge Sire (Serĝo Sir')

85 impasse des Fées 74330 Sillingy
Reto: lasago@free.fr

SAT

Abono al "Sennaciulo" 57 €

■ **En Francio:** Pierre Quillaud; 16 rue du Lt-Vaisseau-Paris 76120 Le Gd-Quevilly p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

■ **En Belgio:** Jakvo Schram; Hof Ter Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen p.k. 000.1692025.54 (Schram - SAT).

SAT-Amikaro

■ Sideja deĵorhoraro.

vidu la apudan franclingvan suplementon.

■ Perkorespondaj kursoj, dua kaj tria grado: Claude Gerlat

50 €. (senlaboruloj kaj junuloj -malpli ol 25j.-: 25 €.)

Ĉeko profite al SAT-Amikaro.

Por pagi:

■ En Belgio: Claude Glady:

Bankkonto N° 750-6373051-18

IBAN B50 7506 3730 5118 BIC: AXABBE22

■ En Svisio: Mireille Grosjean:

Poŝta konto n° 23-14908-9.

Tarifoj 2011	Be, Ch, Fr	Aliaj landoj
Kotizo (kun abono 60%)	35 €	42 €
Kotizo sen abono	14 €	14 €
Subtenkotizo (abono 30%)	70 €	84 €
junulo (malpli ol 25j.), senlaborulo, kunul(in)o	17,50 €	21 €
Minimuma kotizo	libera	libera
Simpla abono	32 €	39 €

■ **En Francio kaj aliaj landoj:** ĉeko al Guy Martin.

■ Pago per ĝiro:

SAT-AMIKARO. CCP: 37 852 90 L La Source.

IBAN, FR32.2004-1010-1237-8529-0L03-314; BIC: PSST FRPPSCE

Kiel traduki Pile

La franclingva vorto **pile**, kaj ties derivaĵoj **piler, pilier, pilon, pilonner** kaj **pilori**, estas uzataj kun tre diversaj signifoj, propraj kaj figuraj, tiel ke ili postulas tre diversajn tradukojn en Esperanto.

■ Ni konsideru unue la vorton **pile**, kiu povas esti substantivo kaj adverbo:

Les piles du pont sont en pierre de taille. **La pilieroj de la ponto estas el tajlitaj ŝtonoj.**

Une pile d'assiettes. **Stako da teleroj.**

Mettre des livres en pile. **Stakigi librojn.**

En informatique, une pile est une liste de type "dernier entré, premier sorti". **Informadike, stako estas datenlisto laŭ la regulo: "laste enirinta, unue elironta".**

Une pile est un appareil transformant l'énergie chimique en énergie électrique. **Pilo estas aparato transformanta kemian energion en elektran energion.**

La pile d'une lampe de poche. **La pilo de poŝlampo.**

Une pile thermoélectrique produit de l'électricité à partir de différences de température. **Termoelektra pilo produktas elektron el temperatura diferenco.**

Son équipe a reçu une de ces piles! **Lia teamo suferis tiel akran malvenkon!**

Le côté pile ou le revers d'une pièce de monnaie. **La dorsflanko aŭ reverso de monero.**

Jouer quelque chose à pile ou face. **Ludi ion je fronto aŭ dorso de monero.**

S'arrêter pile. **Halti abrupte.**

ça tombe pile. **Tio trafe okazas.**

Tu tombes pile. **Vi trafe alvenas.**

Il est trois heures pile. **Estas la tria precize.**

■ Ankaŭ la verbo **piler** havas diversajn sencojn:

Piler de l'ail dans un mortier. **Pisti ajlon en pistujo.**

Il m'énerve, j'ai envie de le piler. **Li incitas min, mi emas dispisti lin.**

En apercevant le piéton, l'automobiliste a pilé. **Ekvidante la piediranton, la aŭtisto bremsis abrupte.**


Le soldat a remplié pour deux ans. **La soldato redungiĝis por du jaroj.**

■ Nun venas la nomo **pilier**:

Le tablier du pont repose sur des piliers en fer. **La planko de la ponto kuŝas sur feraj pilieroj.**

Ces deux personnes constituent les piliers du comité. **Tiuj du homoj konsistigas la kolonojn de la komitato.**

Pierre est un pilier de bar. **Petro estas drinkeja ĉiamulo.**



LibroServo

Sat-Amikaro libroservo

132-134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
Telefono : 01 44 24 50 48 (Vendrede 9H30-17H;
Sabate 11H-18H)
Retadreso: libroservo@sat-amikaro.org
CCP : Sat-Amikaro Libroservo Paris 261211 57 G



Sendkostoj
Al ĉiu mendo
aldonu:
40% ĝis 5€
35% ĝis 10€
25% ĝis 20€
20% ekde 20€

Junulkurso 3a eldono kun komentoj franclingvaj	7,00
Kasedo de Junulkurso, internacie uzebla	7,00
Espéranto Éclair (Raymon Gueguen)	4,00
Cours Rationnel d'Espéranto, édition 2006, broché	10,00
Petite grammaire d'espéranto (Claude Gerlat)	6,00

Communication linguistique (Claude Piron)	5,00
Une humanité, une langue (Simone Glodeau)	2,30
La langue internationale (Raymond Gueguen)	8,00

Dictionnaire pratique (Fr-Eo / Eo-Fr) eldono 2000 formato 140 x 200, tole bindita	23,00
Dictionnaire de poche (Fr-Eo / Eo-Fr) reviziita eldono 2005 formato 105 x 150, 130 paĝoj	4,30
Grand Dictionnaire Espéranto-Français (Gaston Waringhien), 3a, reviziita kaj plibonigita eldono, tole bindita.	23,00
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, eldono 2005 formato 155 x 245, bindita	80,00

Au rugby, la première ligne d'avants se compose de deux piliers et un talonneur.

En rugbeo, la unua avana linio konsistas el du apogantoj kaj unu hokanto.

■ En la sama familio ni trovas la substantivon **pilon**:

Avec un pilon on peut piler du grain dans un mortier.

Per pistilo oni povas pisti grenon en pistujo.

Le marteau-pilon sert à forger de grosses pièces.

La martelmaŝino uziĝas por forĝi dikajn pecojn.

La censure a ordonné de mettre au pilon le nouveau livre de N.

La cenzuro ordonis plendetrii la novan libron de N.

Le pilon de la jambe de bois soutient le moignon de la cuisse.

La stumpingo de la ligna kruro subtenas la stumpon de la femuro.

Le pilon d'une volaille est la partie mince de la cuisse.

La femurajeto de kortbirdaĵo estas la maldika parto de ties femuraĵo.

■ El tiu substantivo derivas la verbo **pilonner**:

On pilonne le grain pour faire de la farine.

Oni pistas la grenon por fari farunon.

L'artillerie pilonnait les lignes ennemies.

La artilerio dispistis la malamikajn liniojn.

■ La lasta vorto de tiu artikolo estas **pilori**:


Le pilori était un poteau auquel on attachait les condamnés pour les exposer au public.

Pilorio estis koloneto, al kiu oni ligis kondamnitajn por elmontri ilin al la popolamaso.

Une campagne de presse peut clouer un innocent au pilori.

Gazetara kampanjo povas submeti senkulpulon al publika maŝato.

Andreo Andrio



Mi bedaŭras, sed «sex-appeal» ne havas lokon en ĉi slipo!



ankaŭ mi bedaŭras!



Fake: Heraldiko

far Sir'

La franclingva vorto por la heraldika figuro **pile** tradukiĝas per **kojno**.

D'or à une pile de sable. El oro kun kojno el sablo.

2 KD ĉe Vinilkosmo

Vidu FrSup, p.10!


Novaĵoj en la fako «Scienco kaj tekniko»

Ilustrita enciklopedio de akvariaj fiŝoj.

Impeto. Moskvo. 2007.

119 paĝoj. Prezo: 9.90 €

Pli ol sepdek fiŝospecioj trovis lokon en ĉi tiu bele farita libreto; indeksoj en la lingvoj: Esperanto, latina, angla, franca, germana kaj rusa.




Ilustrita enciklopedio de hejmaj mamuloj.

Impeto. Moskvo. 2008.

240 paĝoj. Prezo: 18.90 €

Utilaj informoj pri dekoj kaj dekoj da bestospecioj; indeksoj en la lingvoj: Esperanto, latina, angla, franca, germana kaj rusa.



Libro vivas pli longe ol unu sezono...

Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatempe, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.

La danĝera lingvo

Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto

Ulrich Lins

dua eldono «Progreso» 1990, 568 paĝoj, bindita, 32 € en la Libroservo.

Jen legenda libro por ĉiuj esperantistoj: por tiuj, kiuj de longe komprenis ke Esperanto estas «revolucia» lingvo kaj por tiuj, kiuj volas vidi en Esperanto nur «neŭtralan» pontolingvon. Ĉu la unuaj pli mirus pri la enhavo de ĉi libro, ol la duaj? Mi ne certas... Kolosa laboro de Ulrich Lins, de la «Naskodoloroj sub la cara cenzuro» al la «Esperantistaj nazioj», de la «Persekutoj en orienta azio» ĝis la «Kialoj de la perejo de Esperanto en Soveta Unio. Jen ekstrakto de tiuj ĉi kialoj:

De la plej multaj esperantistoj, kiujn trafis malliberigo, mankas detaloj pri ilia fina sorto. Drezen estis, laŭ Ryt'kov, mortpafitaj jam en 1937; laŭ aliaj informoj, li pereis en mortotendaro. La ĵurnalisto Nikolaj Nekrasov, riĉiginta la literaturon de Esperanto, ankaŭ li komence amiko, poste kontraŭbatalanto de Lanti, pereis en 1939 en siberia punlaborejo. Samjare mortis «post longa nekuraĉebla malsano», nur 35jara, Viktor Kolĉinskij, kiu en 1936 estis kuraĝe protestinta kontraŭ malrapido de la soveta Esperanto-movado. En iu ekstermejo malaperis ankaŭ Vladimir Varankin, aŭtoro de *Teorio de Esperanto* (1929) kaj de la originala romano *Metropoliteno* (1933) [11 € en via preferata libroservo!], kiu en 1926 estis helpinta lanĉi la utiligon de Esperanto en la internacia laborista korespondado. La ukraina verkisto Volodymyr Kuzmyĉ, kiu verkis ankaŭ esperantlingve, mortis en mallibereco en Alma-Ata en oktobro 1943. Sed pri la plej multaj konataj esperantistoj, al kiuj apartenas ekzemple Spiridoviĉ, mankas informo, kio okazis al ili.

La malliberigo de la gvidantoj trenis post si ĉiam pli multajn viktimojn: ne nur funkciulojn sur loka nivelo, sed fine ankaŭ la grandegan nombron de ordinaraj membroj. Semen Podkaminer, kunorganizinto de la SAT-kongreso en Leningrado, kiu eskapis arestiĝon, sed estis elpelita el la Partio, memoras: «El la leningradaj esperantistoj estis en 1937 arestitaj 14 gravuloj, kaj ni sidis hejme tremante, atendante nian vicon.» Kvankam tiu ĉi atesto aludas pri disvastiĝanta timo, ĝis la lasta momento troviĝis esperantistoj, kiuj, plene fidante la justecon de la reĝimo, naive plu praktikadis la lingvon, korespondis kun eksterlandaj amikoj aŭ, kiel faris Ryt'kov

ankoraŭ fine de 1937, akceptis en sia hejmo gaston el kapitalisma lando. Ryt'kov raportas, ke kiam Drezen kaj la IPE-respondeculo Muravkin estis arestitaj, multaj subpremis sentojn de maltrankviliĝo, konsciigante al si, ke la latvo Drezen parolis la rusan lingvon kun fremda akcento kaj ke Muravkin longe studis en Germanio kaj portis iom tro kvalitajn vestojn – konkludante do, ke ili eble fakte havis rilatojn kun «kontraŭsovetaj elementoj». Nur kiam Gavrilo kaj Robicsek, liaj intimaj amikoj, estis arestitaj, Ryt'kov «komprenis, ke okazis io maljusta», sed eĉ tiam li ne ĉesis okupiĝi pri Esperanto...

...La giganta arestamaŝino silente, sed nehaltigeble englutis ankaŭ la simplajn esperantistojn. Eĉ tiam ili ne tuj konsciis, kio terura ilin atendas. Kiam Ryt'kov estis arestita en la nokto de la 21a/22a de marto 1938 – la sekretaj policanoj konfiskis ankaŭ kofron kun liaj leteroj ricevitaj el eksterlando -, li serioze kredis, ke oni venigas lin al Lubjanka pro traduklaboroj. La veran kialon li eksciis post alveno en tiun fifaman turmentejon de Moskvo. Kiel ĉiu arestita esperantisto li aŭdis la jenan stereotipan akuzon: «Vi estas aktiva membro de internacia spiona organizaĵo, kiu sin kaŝis sur la teritorio de USSR sub la nomo de Sovetrespublikara Esperantista Unio».

Dum la pridemandado oni montris al Ryt'kov la protokolon de unu el liaj sortofratoj. Li rekonis la subskribon de Roman Nikol'skij, kiu, en 1926

en Smolensk, estis lia instruisto de Esperanto. Laŭ la protokolo, Nikol'skij konfesis, ke li planis mortpafi Stalinon dum akcepto en Kremlo. De aliaj, jam kondamnitaj esperantistoj Ryt'kov vidis atestojn, en kiuj li mem estis nomita – kiel membro de la spiona organizaĵo SEU. Hazarde, en koridoro li renkontis sian amikon Gavrilo, kiu, jam rompiĝinte pro la torturoj, flustris (en Esperanto): «Pardonu min, mi denunciis vin, vi povas same fari kontraŭ mi. Almenaŭ vi tiam ne multe suferos. En ĉiu okazo ni ĉiuj estos senditaj al koncentrejo.» Ryt'kov ne tiris iun post si, rifuzante denunci esperantistojn amikon, sed nun komencis kompreni, ke li ne povas elsaviĝi. Post kvar monatoj, en somero 1938, Ryt'kov estis transportita per vagonaro al Vladivostoko, kie li revidis la glumarkedesigniston Gurov. Ilia komuna restadejo iĝis la teritorio Kolyma, la plej terura loko en la ekstrema nordoriento de Soveta Unio....

... Laŭ Ryt'kov, 30.000 sovetaj esperantistoj estis arestitaj, el kiuj kelkdeko estis mortpafitaj; miloj mortis poste, kaj nur tre malmultaj revenis... Nur 24jara, kiam li estis arestita, Ryt'kov liberiĝis en novembro 1955... Ĉirkaŭ la sama tempo liberiĝis ankaŭ Demidjuk; alia gravulo, kiu transvivis ĉ. 18 jarojn da punlaboro, estis Pavel Ŝumilov.



Ulrich Lins

Frostiga legado! Des pli, kiam mi legas pri la granda aktoro Nikolaj Ryt'kov, kiun mi havis la ĝojon spekti, antaŭ proksimume 40 jaroj en la pariza laborborso, okaze de SAT-kunveno.

Jak Le Puil

E-kuku!

Kvadratoj da cidonia sukerpasta

Ingrediencoj:

Unu kilogramo kaj duono da cidonioj
Ĝeliga sukero
Kristalsukero,
Unu citrono

Agmaniero:

Senŝeligu la cidoniojn kaj forprenu la koron kaj la grajnoj.

Kuiru ilin en unu litro da bolanta akvo kun ŝeloj kaj grajnoj metitaj en unu pecon da muslino kaj kun unu rondpeco da citrono dum tridek minutoj.

Elverŝu la cidoniojn en kribrileton por kribri ilin kaj ricevi nur likvaĵon.



Metu tiom da ĝeliga sukero kiom da cidonioj en grandan kaserolon kun dudek kvin centilitroj de la akvo de la kuirado de cidonioj kaj atendu la boladon.

Dume muelu la cidoniojn per muelileto



kaj metu ilin en la kaserolon kun unu kulereto da citronosuko.



Kirlu la miksaĵon dum kvin minutoj.

Elverŝu la miksaĵon en grandan ortangulan muldilon, atendu plurajn



tagojn por la sekigado kaj detranĉu por fari malgrandajn kvadratojn kaj trempu ilin en kristalsukeron.

Anne-Marie

Seta kongreso:

Tuttagaj

TT1: «Kiel estis la romia urbo Nimo?»

Ni vizitos:

En Ambrussum:

Ni marŝos kiel romiaj legianoj, sur la vojo «Domitia» kiu kunligis Romon kaj Hispanion tra la nuna Langvedoko

Apud Remuleno:

Ni ekrigardos la «Gardan Ponton», la akvedukton, kiu provizis la antikvan Nemozon (nun Nimo) per akvo; ĝi apartenas al la Monda kultura heredaĵo de UNESKO

En Nimo:

Ni revivos gladiatorajn batalojn en la Areno⁽¹⁾

Ni inspektos la fortikaĵojn, kiuj protektis la urbon kontraŭ barbaroj (Aŭgusta pordo kaj Magna turo)

Ni adoros diojn en la «Kvadrata domo»⁽²⁾

Ni vidos la «Castellum», kiu distribuis akvon tra la urbo

Ni promenados tra la Fontana Ĝardeno, kiu estis plezura loko por romianoj. Ni trovos misteran Dianan templon, fonton de la dio Nemozo...

■ Mardon la 26an de 9a 15 ĝis 18a 15. Prezo: 40€ (buso, restoracio kaj monumentoj)

NDLR:

⁽¹⁾ Ĉu vere ni «ĝuos» tian spektaklon?

⁽²⁾ Tio estas humuraĵo, ĉu ne?

TT2: Eta Kamargo

La ĉefa temo de tiu tuttaga ekskurso estas la malkovro de tipaj aspektoj de la mediteranea marbordo, de la urbo Seto ĝis Kamargo.

Laŭ geologia vidpunkto, la regiono konsistas el marĉoj, lagunoj, pli malpli kunligitaj al la maro, pli malpli disigitaj de bendoj da tero. Tiu lando, malrapide sed senĉese evoluas.

En tiu medio, vivas tipaj faŭno kaj flaŭro. Kamargo entenas Nacian Naturan Parkon, kun giganta laguno – la Vakaresa laĝeto – kie la virbovoj kaj la rozaj fenikopteroj regas.

La homaj aktivecoj, kiuj iom post iom plifortiĝis, profitis el tiu marbordo: fiŝhavenoj, turismhavenoj, banlokoj, konkbredado, sabla vitejo, sallaguno...

La homa okupado disvolviĝis dum multaj jarcentoj. Oni povos admiri, ekzemple, la majestan katedralon de Magelono (9-a jarcento), meze de la marĉoj; la urbon kaj la remparojn de Akvemorto, kie la Reĝo Sankta Ludoviko enŝipiĝis por la krucmilito (13-a jarcento) – la urbo

hodiaŭ estas meze de la tero, la haveno tute malaperis! –; la urbeton San-Marioj-Maraj kie, laŭ la legendo, elŝipiĝis, antaŭ longa tempo, Marie-Salomé, Marie-Jacobé kaj ilia nigra servistino; fine la freŝdatan (fino de la 20-a jarcento) banlokon La Granda Moto....

Tiel ne mankas spuroj kaj atestoj pri valora estinteco.

■ Mardon la 26an de 8a 45 ĝis 18a 30. Prezo: 50€ (buso, restoracio kaj monumentoj)

TT3: La Suda Kanalo

Buse ĝis la Nova Haveno en Beziero, ni eniros barĝon por bela promenado sur la kanalo. De la kanal-ponto, ni miros kaj fotos la belajn fortikaĵojn de la urbo spegulitaj en la rivero Orbo. Poste, ni trapasos la Naŭ Kluzojn en Fonserano kaj dum la navigado sur la Granda Interkluzo ni tagmanĝos, tra la vitkamparoj. Tio kondukos nin ĝis la tunelo Malpaso, eta reiro, elirado el la barĝo en Kolombjero, kaj tuj, jen la vizito ĉe vinberkulturisto (kvina generacio) por gustumi langvedokajn vinojn, eĉ aĉeti se oni deziras. Finfine buse ĝis Serviano por vidi tre belan mediteranean ĝardenon.

■ Mardon la 26an de 8a 15 ĝis 18a. Prezo: 55€ (buso, restoracio kaj monumentoj)

TT4: «Tra Cevenaj montetoj per vaportrajno»

Ni veturos per vaportrajno de Anduzo ĝis San-Jan-de-Gardo. La trajno serpentas laŭlonge de la rivero, inter arbaraj montoj, tuneloj kaj viaduktoj... La vojaĝo daŭros 40 minutojn tra mirindaj pejzaĝoj. La Trajno de Ceveno posedas plurajn vaporajn lokomotivojn konstruitajn en Germanio, Francio kaj Anglio. Ĝi tiris karbajn vagonarojn en Ceveno aŭ Germanio, artileriajn trajnojn en Francio dum la unua mondmilito...

Poste, ni promenados tra la bambua arbaro kaj vidos aziajn domojn el bambuoj.

Fine, ni vizitos la muzeon pri la malfacila vivo en la cevenaj valoj dum pasintaj jarcentoj: Ni vidos ilojn, meblaron, tradiciojn, bredadon, malnovajn metiojn en malproksimaj valoj, kie protestantoj fuĝis, persekutitaj de la reĝa armeo.

■ Merkredon la 27an de 9a ĝis 19a. Prezo: 55€ (buso, vaportrajno, restoracio, bambua arbaro kaj muzeo).

Frédéric Bourquin
Serge Eysseric
Pierre Taupiac

ekskursoj



TT1 (26a) Nimo.



TT2 (26a) Eta Kamargo



TT3 (26a) La Suda Kanalo



T4 (27a) Cevena trajno

Vidu kovrilpaĝe aliajn fotojn tiurilatajn.

Fontano (38 Fontaine)

la venonta regiona kongreso de la Rodanalpa Federacio okazos en Fontano (apud Grenoblo), inter la 13a kaj la 15a de majo 2011

Jam okazis en Fontano, inter la 25a kaj 27a de junio 2010, festo de la «Alpa Laboristo», monata gazeto de la federacio de la komunista partio en Izerio. De 2005 esperantistoj tie deĵoras dum la tri tagoj, informante pri Esperanto, kun la substrekinda praktika helpo de kelkaj simpatiantoj.

Kompare kun la apudpariza Homarfesto, la vizitantombro estas kompreneble multe malpli granda, sed tio ebligas iom pli profundajn diskutojn. Por mi, kiu ĉeestis unuafoje, estis plezuro konatiĝi

Vinko Markovo

ESPERANTO



kun la esperantistoj el la grupoj, kiuj funkcias en la ĉirkaŭgrenoblaj urboj Sankta Marteno de Hjero, Fontano kaj Sankta Egrevo, kaj ekscii pri la aktivajoj de la neĉeestantoj (interalie, pri enkonduko de Esperanto en infanlernejoj).

Esperantistoj

Parizo (75)

Estis granda sukceso la 17a eldono de la «Café espéranto».

Triafoje ĝi okazis en la asocia kafejo «La Commune», au 3 rue d'Aligre, dank' al bonega organizado (aparte kuirada) de Philippe kaj la loka asocia skipo.

Une cinquantaine de participants, malgré l'absence de plusieurs « clients » habituels. Estis kelkaj novaj homoj, inter kiuj unu el Annecy, kiu hazarde estis en Parizo ĉi-semajne.

Un programme bien rempli: Au début, un concert de Famo accompagné de Tarik, de chansons originales et de reprises, avec l'accordéon.

Puis un repas à des prix très compétitifs. Une lecture à haute voix de l'appel de Etsuo Miyoshi aux francophones, relatif à la pub dans le Monde, en espéranto par Vito Markov et en français traduit à la volée par un des responsables du local, kiu eklernis la lingvon Eo antaŭ kelkaj monatoj;) Etaient présents un exemplaire du journal Le Monde daté du 16/12/2010

ainsi que des copies A4 des 2 pages de publicité et de l'appel de Miyoshi paru dans la revue Esperanto.

Resume, la Kafejo Esperanto estis bonega maniero Zam'festumi. la tuta vespero estis tre Esperanta, muzika, manĝa kaj Le Monda!

Ne-ĉeestantoj bedaŭru, kaj venu venontfoje!

Aleks

(kiu respondecas pri la lingvo uzata)



aktivitas

Stelaplaĝo (62 Stella-Plage)

22-a Eŭropa Rendevuo

13-14-a de novembro 2010.

Aliĝis 145 personoj (inter ili 20 junuloj) el deko da landoj en la bela feriejo Stella-maris. Riĉis la programo starigita de Esperanto-Nord: 5 diversnivelaj kursoj kun preparo al la francaj kaj KER-ekzamenoj, Lingvo Festivalo, koncerto de Kajto, vizito de la banurbo Le Touquet kaj ties samtaga Librosalono.

En 2011 oni staĝumos samloke la 12-13an

de novembro kun la fama bardo kaj aktoro Georgo Handzlik, kiu koncertos kaj prezentos sian kortuŝan teatraĵon pri Ludoviko Lazaro Zamenhof. Ne maltrafu!

Edmond Plutniak



Greziljono Kion ni povis fari...

Ĉu elkoŝmariĝo ?

Vidu
artikolon
p. 6

